

Theodor Storm,

## La mevo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Norden flugas jen la mevo,  
Norden ankaŭ mia kor';  
Flugas ili ambaŭ kune,  
Flugas ili hejmen for.

Kor', vi jam alvenis tie;  
Flugis rapidege vi -  
Kaj la mevo supermare,  
Ŝvebas ja ankoraŭ ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "Die Möwe" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 - †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2005-05.03.*

*MR-437-1 / Arg-308-625 (2005-08-26 11:46:07)*